


PENSEO

N-ro 330

apr. / 2019

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Lily (Ĉinujo)

Aprilo

Vent' aprila
pigre blovas,
per peniko movfacila
verde farbas montojn,
per la broso kolorŝmira
la tapiŝon herban helverdigas,
per kareso mansimila
estaĵetojn jam vivigas
el la dorm' trankvila.

Sun' aprila
lumas varme,
per flaveto eliksira
kolzon ja ornamas,
per magi' inspira
persikflorojn ruĝetigas,
per arĝento brila
pur-blankigis la pirflorojn
jam el stat' senila.

Pluv' aprila
gutas teren,
per fridet' elspira
vekas nian vervon,
per humid' subtila
urĝas nin al pensoj,
per nebul' altira
spronas vipe
nin al ont' aspira.



Viv-vojaĝo

Se mi ne renkontus vin,
mi ne scius, kiel kontraŭstari
forlasitecon kaj solecon en destin',
dum viv-vojaĝo longa.
Se vi ne eskortus min
sur la longa vojo malebena,
mi ne havus ĝojon en anim'.
Mi ne zorgas pri l' estonto
ĉu mizera ĉu en fascin',
sed nur pri plezuro
dum vojaĝado ĝis la fin'.
Mi volontas ja promesas,
ke mi ĉiam kun obstin'
kune kun vi traveturas
la hom-mondon per pilgrim'
suferplena sed feliĉa
ja ĝis nia am-kulmin'.

Sero (Ĉinujo)

Printempa pluvo

Printempa pluv' sen sono
faladas molleĝere
jen kiel silkfadenoj el kokono,
kaj elversiĝas sur la teron.
Alvenas ĝi por semoj en bezono
al la ĉiela suko
por naskiĝonta burĝono.

Kristalaj pluvogutoj
ja travideblaj kun brilpuro,
tralavas ĉion, krokizante
printempon jen per belfiguro

kaj flirtas en aero
dancante kun plezuro.

Subtilaj pluvogutoj
verŝajne kiel dolĉa vino
jen ebriigas florojn,
salikojn per sangvino.
Velkintaj herboj pro ĝi
etendas tigojn sen kapklino.

Valoras la printempa pluvo.
Ĝi gutas kiel mielrosoj—
nutraĵo por arbidoj,
kaj sprosoj, ŝosoj
—kiel poemetoj
skribitaj kun patosoj.

Mi kvazaŭ vidas en ĝi larmojn
de amatino mia en la foro.
Ŝteliras ŝi en mian sonĝon,
frapetas je mia koro
kaj petas de mi
la vortojn de konsolo.



Mori (Usono)



AFORISMe(40)

Nur al nefarita faro
mankas eraro.
***
Du homgrupoj
neniam eraras
la unua estas:
despotoj,
la dua estas:
idiotoj!
***
La plej granda NULO
estas ĵaluza ulo.
***
Post la tempesto
venas la tempo
de kunfesto.
***
La plej lasta
konkero
apartenas al
Vero.
***
En ĉi tiu ĝangalo
sub l' regado de
senbrida kapitalo
oni kunkuras
samkiel animalo.
***
Religio, kiu subtenas sin
per subpremo ,
torturo kaj batalo
ne estas religio de Dio
sed tiu de
homfigura diablo.
***
Oni sur la alta posteno
estu plej afabla
kaj modesta persono.
***
Politika ludo
estas kiel piedpilko
ĉiuj kuras post la pilko
ĉu amiko, ĉu malamiko.
***
Sub la premo de bezono
Homo ofte agas
samkiel hieno,
aŭ azeno.
***
Oni sen riĉa
Sinteno
ne estas riĉa
persono.
***
Nek batalu kontraŭ diablo

nek kunfestu kun li
ĉe la manĝotablo
***
malgrandanima,
stulta persono
sur l' juĝista posteno
estas katastrofo
kaj malbeno
***
Murdo ĉiam estas murdo
Ĉu en la militoj kaj bataloj
ĉu en la urboj kaj dancohaloj.
***
La plej abomenindaj homoj
ĉirkaŭ despotoj
estas lakeoj, friponoj
kaj idiotoj.
***
Se al vi
ne mankas
sano kaj pano
zorgu pri malsana
kaj malsata homarano.
***
Afabla koro
kaj saĝo
Pli gravas ol
bela vizaĝo
***
Ni havas bonegajn okulojn
por vidi alies makulojn
sed pri niaj makuloj
ni estas blindaj uloj.
***
Tie , kie ĉiu homo
estas sola, senhelpa
en sia vivobatalo
tie ja estas ĝangalo.
***
Vivo de belaj,
senpekaj kolomboj
estas sufiĉe bona kialo
por neniigo de bomboj.
***
Mi parolas
plej elokvente
nur tiam, kiam
mi parolas silente.
***
Grandas la diferenco
Inter riĉa persono
kaj homo
kun multe da mono.
***
La diferenco
Inter amo ksj amoro
estas kiel la diferenco
inter pura oro
kaj orkoloro.

Wally du Temple (Kanado)



Ganto Perdita

Ne ploru pro
La perdita ganto
Ĉe pluva pavimo
Kies lanan stomakon
Eltiras patrina muso
Kies koro instinkte
Sekvas kosman
Urĝon fari
Generan neston.
Ne ploru tro!

Fangfang (Ĉinujo)

Rememoro de folio

Mi iam havis pompon
pendanta alte sur branĉpinto
kun bonodoro de juneco.
Mi ankaŭ ĝuis
aprezon de la blankaj nuboj,
kareson de la suno,
alvokon de leĝera vento

kaj duŝon de la pluv’ kaj rosoj.


Mi iam havis ĝojon:
kun birdoj kanti kune,
aŭskulti al ĉirpado grila.
Sub mi la homoj trinkis teon,
babilis pri diversaj mirrakontoj.

Mi iam partoprenis
feliĉon de geviroj
kverantaj kaj kisantaj
sincere en ardanta amo
kaj por venonta kuna vivo.

Mi iam spertis
vipbaton de feroca vento,
vergadon de pluvego,
sed mi eltenis firme
la provojn de naturo
por bone varti kreskon
de ruĝaj floroj
kun kor’ trankvila.

Nun mi jam finis
mision mian de naturo.
Mi tuj foriros kun rideto,
sen tristo kaj ĉagreno,
bedaŭro kaj rimorso,
nur kun fiero.
Mi diru al vi adiaŭon,
amikoj! ĝis la venontjara
plezura rekuniĝo!

Papos Nascentes (Brazilo)



PARTIKLO

la mola gustum' de l' ronda kurb'
venos el la brilo de sia maldika ir'
venos el tio, kio eble sin kaŝas
venos kiu scias el ĉi poezi'
el ĉi partiklo de ĝoj'
kiu sin scias ondon, malgraŭ tio
sed, tiu funebroŝec'
venas el kie? kie?

ASCENSION

de ludem' al voluptem', de libido al lekado,
de prizorgo al klitoro, de uvulo al vulvo,
de tranco al seksumo.

de ornam' al volupto, de morus' al aromo,
de intenso al incenso, de vino al divino,
de seks-urĝo al tenero:
de miksado al mistero.

NE PLU NE PLU

ne plu morgaŭos mi ne plu ne plu
estante ĉi esti nur tie ĉi
subĉiele estu mi la blu’
ĉiuĉele ĉi bluo estu mi

en mia korpo kiel energi’
kiel informo kun sia influ’
hodiaŭos tuje finfine mi:
ne plu morgaŭos mi ne plu ne plu

Jado (Ĉinujo)



La unua renkontiĝo

Rigard’ serena via
ekbrilas je kaplevo
ja kvazaŭ lumo ĉe l’ aŭroro.
Mallumon ĝi dispelas
por lamp’ en mia koro.

Alloga dorsfiguro via
min ravas en mil revoj
ja kvazaŭ la feino el ĉielo
svaga en nubo kaj vento
melankolion al mi lasis kun kruelo.



Gajo (Ĉinujo)



Al iama amatino

iama bela knabo jame mortis,
nun restas krom oldulo nur nenio!
sed tamen vi ne devas tro malĝoji,
plibonas pura amikec' ol ĉio!

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Hajkoj

Senvestiĝas jam
la arboj en aŭtuno.
Striptiz' por birdoj.

❄

Pluvaj gutetoj
kisas mian vizaĝon.
Perdita ombrel'.

❄

Scenej'. Artistoj.
Post kulisoj – silento.
La maskoj falas.

❄

Grila koruso
sonplenigas ĝardenon.
Nokta mantelo.

❄

D e m etis tufon
li en petole m a harar'.
La vert' ekbrilis.

❄

Ĉe l' fontano Li
pro mesis a m o n, sed Ŝi.
aŭskultis bruo n.

❄

Jen – ni disputas.
Vo ĉe vi. Silente mi.
Pa cku nloĝ ad o.

❄

Vespertristeco
survoje min vizitis
Krevita pneŭ m atik'.

❄

Mi, Penelop o,
atend as Odiseon.
Retba bilante.

❄

Bo kaleto kun
balza m'ĉe la spegulo.
Lasta espero
el Araneaĵoj

El Ĉina Antikva Poezio

Du Shenyan (ĉ. 645 – ĉ. 708)

Ekskurso en frua printempo

(Samrima respondaĵo al samtitola poemo de mia amiko)

Nur regnoficistoj, kiuj servas aliloke,
Pri la renoviĝo de sezonoj sin surprizas:
En la rozaj nuboj levas sin la sun' el maro;
La umeojn kaj salikojn trans rivero skizas
La printemp'. En ties varmo orioloj verve
Kantas; la sunbrilo lemnojn hele nun
verdizas.
Aŭskultante vian melodion, mi je l' hejmo
Eksopiras, kaj la nostalgi' min paralizas.

Wang Wei (701 – 761)

La monto Zhongnan

La monto Zhongnan proksimiĝas al ĉefurbo,
Kaj trae sin etendas ĝis la mara bordo.
La blankaj nuboj post mi kunas en la mason,
Dum antaŭ mi l' nebul' foriras sen form-ordo.
Duflanke de l' monteĝo ŝanĝas sin pejzaĝo:
Al la malhelaj l' helaj valoj mal-identas.
Por nokti, trans la rojo mi arbohakiston
Demandas, kie tranoktejo sin prezentas.

Cen Shen (ĉ. 715 - 770)

Vizito al la pavilono Zongchi

Proksimas al la firmamento
De pavilono la tegmento.
Ĝi altas eĉ ke mi perceptas
Supre: la suno min akceptas.
Kiam serena tago brilas,
Ĉe-putaj arboj hele milas;
Se super montoj nuboj ŝvebas,
Tristecon tio reliefas.
Ĉe l' balustrado mi rigardas
Malsupren: Qin-monto malaltas;
Tra la fenestro: Wei-rivero
Fadene fluas sub l' etero.
Se mi la zenon pli ol frue
Ekkonus, tiam asidue
Mi volus iri, kor-konfida,
Al Budho en statu' orita.

Wang Bo (650 - 676)

Adiaŭ al mia amiko, kiu oficos en Shuzhou

La ĉefurbon tri strategilokoj remparas spacvaste,
En nebulo l' kvin sudaj pramejoj apenaŭ vidatas.
Ĉe la ĝis' al vi, mia amiko, min kaptas kunsento:
Kiel regnaj servistoj fremdloke ni ambaŭ sam-statas.
Por intimaj amikoj interne de l' kvaro da maroj,
Eĉ grandega distanco najbaras, - jen oni konstatas.
Disiĝante ĉe la vojoforko, ni certe ne estu
Kiel karaj geuloj, ja kiujn la larmoj invadas.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinujo)

Liu Yong (ĉ. 984-1053)

Ĉe Baling-ponto

—laŭ melodio *Vojaĝo en juneco*

Ĉe Baling-ponto
la arboj altaj kaj malaltaj
sin klinas ja en nebul-ondo,
elspiras ĉiuj la etoson
de du antaŭaj dinastioj
en fora horizonto.
Dum longa tempo
kaj ofta pluk-derompo
salikoj kadukiĝas,
branĉmankaj sur la monto,
malgrasaj kiel la talioj
de la knabinoj en palaca rondo.

En krepusk-mondo
subira sun' en aŭtun-fino
oblikve iras al malfronto
de mont' volvita brume.
Mi plenas je ve-desaponto,
morozas ankaŭ herboj
sur sabla benko.
Ario sonas de l' rakonto
pri disiĝ-sentoj akre
disŝiras mian koron.
Senvoĉe mi lamentas,
interne kun tranĉ-tondo.

Sur l'antikva vojo

—laŭ melodio *Vojaĝo en juneco*

Sur l' antikva vojo
lante trotas mi ĉevale,
dum cikadoj ĉirpas brue
sur salikoj joviale.
Ĉe l' subiro de la suno
birdoj hejmen flugas are.
Vent' aŭtuna blovas forte
kaj balaas nun barbare
vastan l' ebenaĵon.
Mi rigardas jen senbare
al forec' dezerta, larĝa,

mi min sentas ja amare
kor-soleca.

Mi esperas,
ke mi malaperu tuje
al hejmlok' senspure,
rendevu' fatale
kun ŝi ankaŭ fale
venas al nenio.
L' interes' jam pale
malpliiĝas por ekskurso,
vin-amikoj nelojale
nun reduktiĝas.
Pasis jam koŝmare
la juneco for, ve! mi jam
kadukiĝas senerare.

Brizo blovas

—laŭ melodio *Fenikso sur platanbranĉo*

Brizo blovas
kun leĝer'.
De sur alta etaĝturo
mi rigardas malproksimen
al ĉiel'.
Tuj mi naskas tristan senton
pro printemp-foriro
el la ter'.
En oblikvaj lumoj
de la suno
ĉe vesper',
herboj des pli verdas
jen kun bel'.
Sed, ve, kiu ja komprenas
mian senton enan
do, en ver'?

Mi orgii volas
kun liber'
per drinkado kaj kantado,
por ĝisosta ebriiĝo
kun prefer'.
Sed nenian intereson
tio vekas ĉe mi
en vinpel'.
Mi neniam serĉas
pentojn pro magriĝo
kun sufer'
en vestaĵoj lozaj,
ĉar mi faras ĉion
kun esper'
por ŝi ekskluzive
kun sincer'.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinujo)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKOKA

Perfekta Ĝojo

§18-01

Ĉu efektive troviĝas perfekta ĝojo en la mondo? Ĉu efektive troviĝas iaj manieroj, en kiuj ni povas ĝui la vivon kun perfekta ĝojo? Se troviĝas iaj, kion do ni, por plenĝoje ĝui la vivon, devas fari kaj sur kio ni nin devas apogi? Kion ni devas eviti kaj kion ni devas adopti? Kion ni devas sekvi kaj kion ni devas forlasi? Kion ni devas ŝati kaj kion ni devas malŝati?

Tio, kion la tuta mondo respektas, estas la riĉaĵoj, la honoroj, la longviveco kaj la bona famo. Tio, kion la tuta mondo amas ĝui, estas la komforta vivo, la abunda nutraĵo, la luksaj vestoj, la belaj koloroj kaj la dolĉa muziko. Tio, kion la tuta mondo abomenas, estas la malriĉeco, la malnobleco, la antaŭmatura morto kaj la malbona famo. Tio, kion la tuta mondo prizorgas, estas la manko de komforta vivo, de abunda nutraĵo, de luksaj vestoj, de belaj koloroj kaj de dolĉa muziko. Se oni estas en manko de tiuj ĉi plezuroj de la vivo, oni

maltrankviliĝas kaj ĉagreniĝas. Ho, kiel stulta oni estas en tia maniero bonfartigi sian korpon!

La riĉuloj lacigas sin per intensa laboro, por amasigi pli da riĉaĵoj, ol kiom ili mem povos konsumi. Kiel superfluaj estas iliaj agoj en sia bonfartigo! La distingiĝuloj pensas kaj repensas tage kaj nokte pri la ĝusteco kaj malĝusteco de siaj agoj kaj paroloj. Kiel neglektemaj ili estas pri sia bonfartigo!

La homo naskiĝas en tiun ĉi mondon kune kun maltrankvilo kaj zorgoj. En la mensa konfuziteco la longvivuloj vivas sian longan vivon de maltrankvilo kaj zorgoj. Kiel mizeraj ili estas! Kiel fore ili sin distancigas de la bonfartigo! La herooj de martireco estas laŭdataj de la homoj en la mondo sed ili malsukcesis en la konservo de la vivo. Mi ne scias, ĉu iliaj meritoj estas bonaj aŭ ne. Eble mi devus pensi, ke iliaj meritoj estas bonaj, sed ili ja ne povis konservi sian vivon; eble mi devus pensi, ke iliaj meritoj ne estas bonaj, sed ili ja konservis la vivon de aliaj homoj.

Tial proverbo diras, ke "kiam via lojala admono ne estas akceptita, vi devas ĝin retiri kaj deteni vin de plua disputo." Wu Zixu siatempe disputis kun la reĝo kaj estis mortigita; se li ne argumentus kun la reĝo, li ne akirus sian bonan famon. Nu, se tiel estas, ĉu do efektive troviĝas io, kio povus esti rigardata kiel bono?

Koncerne tion, por kio la nunaj vulgaruloj klopodadas kaj en kio ili trovas ĝojon, mi ne scias, ĉu ilia feliĉo estas vera aŭ ne. Koncerne tion, en kio la vulgaruloj trovas ĝojon — tion, kion la homoj en la mondo ĉasas amase kaj konkure per ĉiuj siaj fortoj kaj kion ili universale nomas ĝojo — mi ne scias, ĉu ilia ĝojo estas vera aŭ ne. Ĉu do efektive troviĝas io, kio povus esti rigardata kiel ĝojo? Laŭ mi, la vera ĝojo kuŝas en la sindeteno disde la agado, dum la vulgaruloj rigardas ĝin kiel la plej grandan malĝojon. Tial proverbo diras: "La plej granda ĝojo estas sen ĝojo; la plej granda famo estas sen famo."

En tiu ĉi nia mondo la ĝusta kaj la malĝusta estas nedifineblaj, sed malgraŭe la sindeteno disde la agado povas helpi solvi tiun ĉi embarason. Detenante nin de la agado ni plej proksimiĝas al la perfekta ĝojo kaj la bonfarto. Permesu al mi provi fari eksplikon. La ĉielo estas klara pro tio, ke ĝi faras nenion; la tero estas kvieta pro tio, ke ĝi faras nenion. Ĉar la ĉielo kaj la tero ambaŭ faras nenion, ĉiuj estaĵoj en la mondo naskiĝas el ilia harmonia kuniĝo. Obskuraj kaj maldiafanaj, ili ŝajnas veni de nenie. Maldiafanaj kaj obskuraj, ili ŝajnas lasi nenian postesignojn. Ĉiuj estaĵoj en la mondo, malgraŭ sia granda diverseco, naskiĝas egale en tia maniero. Tial, kiel estas dirite, "La ĉielo kaj la tero faras nenion kaj nenio ne naskiĝas el ili." Kaj tamen kiuj el la homoj do povus sin deteni de sia agado?

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Yanke (Ĉinujo)

Neĝero flirtas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Neĝeroj
fliras kun leĝer'
jen supren jen malsupren
dancante en frost-aer'
super la river'.

Neĝeroj
falas fine jen
en riveron fluantan
kaj tuj akviĝas en sven'
sen ajna kriĝem'.

Tavolo
da neĝ' sur tero
dikiĝas ja pli kaj pli,
glimas kun blanka belo
sub suna helo.

Ĝi vestas
per blank-mantelo
arbojn, domojn kaj montojn,
glaciiĝas en gelo
jen sur rivero.

Ĝi flirtas
en densa nebul'
kiel bird' en aero.
Blovas vento en ulul',
ĝi dancas en rul'.

Malsupren
ĝi flugas bele
ĝis verda arbopinto
kaj kisas ĝin leĝere
kaj nestas sukere.

Atendas
ĝi jen kun sopir'
blankajn amikojn fali
por kuniĝi per dezir'
en sama stabil'.

Neĝeroj,
ha, via vojaĝ'
el la alto ja estas
la spirito de kuraĝ'
en fluganta naĝ'.

Miriĉ Jadranka (Serbio)



LA VERO VENKOS

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Martiraj
batalantoj. Nin
patrujo bezonas tre.
Leviĝu Serbio sin
protektu ĝis fin'.

Senhalte
jam angoras kor`.
Animo suferanta.
Pro la popola valor`
jam grandas dolor`.

Histori'
miljara via.
Raska, Duklja, Zeta
Bizanco. Poste nia
Serbio pia.

Turka
longa okupad'.
kaj fina ribelado.
Postvivis ni militad'
dum hitlera Ad'.

Komuna
land' dividita,
sange dispartigita.
La popolo bombita
kaj ekstermita.

Luiza CAROL (Israelo)

SOPIRO EN JANUARO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Forflugas
la bird' el kaĝo;
sopiras al suda sun',
al pli bongusta manĝo…
revas pri ŝanĝo…

SOPIRO EN FEBRUARO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Tremtimas
la bird' en vento
en frosta brua urbo,

malsatas sur tegmento
sed sen lamento.

Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Mandio (Ĉinujo)

Rivero kaj monto

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

I.

Flu'
rivera, kun kontinu',
torentas
laŭ mapa sinu'.

Flu'
rivera ĝojas kun sku',
kvazaŭe
por movada ĝu'.

Flu'
rivera, kun kontribu'
al homar'
servas sen enu'.

II.

Mont'
jen alta ĝis horizont'
aspektas
kiel arkpont'.

Mont'
konturas kiel mar-ond',
kun fluo
falanta el font'.

Mont'
nubskrapa super hom-mond'
imponas
per junverda front'.



Mao Zedong (1893-1976)

Tri poemoj

—Laŭ melodio Dekses-Silabo

Mont'!
Fluge rajdas mi per spron'.
Renvide —
je lazur' frapont'!

Mont'
ĉe mont' kvazaŭ ond' ĉe ond'
k mil ekvoj
kurus en lukt-front'.

Mont'
tra l' ĉielo ĉe renkont'!
Ĝi falus
sen vi la kolon'.

Rimarkoj.

La tri poemoj estis verkitaj de Mao Zedong en 1935 dum la Ruĝa Armeo estis en longa marŝo.

Je lazur' frapont'= fraponto je lazuro, t.e. (kiam mi atingas la montsupron) mi estas preskaŭ fraponta la ĉielon (en stato de fraponto je la ĉielo).

Mont' tra l'ĉielo ĉe renkont'= monto trapikas la ĉielon kiam monto kaj ĉielo estas ĉe renkonto.

**Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

elĉinigis



Licius (Ĉinujo)

MARCUS AURELIUS (121-180)

Meditadoj

el ***Libro IV***

*25

Provu ĉu vi havas la kapicion por la vivo de bona homo; la vivo de kontentiĝo pri la donita sorto en la universo, kiu serĉas esti justa en faroj, kaj sindonaj manieroj.

*26

Ĉu vi ĉion, tion vidis? – nu rigardu. Via rolo estas ke vi estu serena, estu simpla. Ĉu iu malbonfaras? La malbono kuŝas ene de tiu. Ĉu io mistrafis vin? Bone; tiam estis via parto de la universala sorto, asignita al vi ek de la komenco de tempo; ia ŝnurero teksita en vian propran reton, kiel ĉio alia kio okazas. Vivo, en vorto, estas mallonga; tiel ekkaptu vian profiton de la preterpasanta horo, pere de obeado al racio kaj justa agado kun aliaj. Malstreĉiĝu. Estu sobra.

*35

Ni ĉiuj estas estaĵoj de la tago; la memoriganto kaj la memoriginto simile.

*36

Observu kiel ĉiuj estaĵoj daŭre naskiĝas el ŝanĝo; instruu al si por ke vi vidu ke la plej granda feliĉo de Naturo kuŝas en tio ke ĝi aliigas estantaĵojn, kaj formigas aliajn aferojn tiajn. Kio ajn estas, estas en iu senco la semo de kio ĝi ekestiĝis. Ĉu bonfamo povas veni al filosofo kiu imagas ke semo estas nur tio, kio estas plantita en la grundo aŭ utero?

*37

Tre onte vi estos morta; sed eĉ nun vi nek estas de stabila menso, nek preter maltrankvilo; nek malkroĉita de ŝajna ekster malbono;nek jam bonkora al ĉiuj homoj, nek persvadita ke ago justa estas la sola saĝo.

*38

Observu zorge tion, kio gvidas la agojn de la saĝuloj, kaj tion, kion ili aŭ evitas aŭ serĉas.

*39

Por vi, malico venas nek el la menso nek de aliulo; nek el iuj fazoj aŭ ŝanĝoj de via korpa formo. Nu, de kie? De tiu parto de via memo kiu agas kiel via taksanto de kio estas malico. Se vi rifuzas la takson, ĉio estas en ordo. Eĉ se la kompatinda korpo, iel ĝia najbaro, estu tranĉvundita aŭ bruligita, permesu ke la voĉo de la taksanto restu silenta; permesu ke ĝi nenion anoncu kiel bona aŭ malbona se ĝi povas okazi al bonaj kaj malbonaj homoj egale – ĉar kio ajn kiu trafas homoj senpartie, ne gravas ĉu ili obeas la regulojn de Naturo aŭ ne, povas nek asisti nek malasisti ŝiajn celojn ilin avanci.

*40

Ĉiam pensi pri la universo kiel unu vivanta organismo, estante solsubstanco kaj unu animo; observu kiel ĉiuj aferoj estas subordigitaj al unu perceptebleco de la tuto, kiel ĉio moviĝas laŭ ĝia impulso, kaj tiel ludas sian rolon laŭ kaŭzo kaj efiko. Remarku la komplikon de la fadenaro aŭ la komplekson de aranea reto.

*41

'Kompatinda animo ŝarĝita per kadavro', Epictetus vokas vin.

*42

Por esti en la procedo de ŝanĝiĝo en si mem ne estas malbona, simile kiel esti la produkto de ŝanĝo ne estas nepre bona.

*43

Tempo estas rivero, la nerezistebla fluo de kreitaĵoj. Unu estaĵo vidiĝas kaj rapide forestas dum alia ekaperas por denove nur forflosi laŭ la fluo.

*44

Ĉio ajn kio okazas estas tiel normala kiel la printempa rozo aŭ la somera frukto; simile veras pri malsano, morto, kalumnio, intrigo, kaj aliaj aferoj, kiuj ĝojigas aŭ afliktas malsaĝulojn.

*45

Tio, kio sekvas estas ĉiam proksime ligita al tio, kio antaŭas; ne estas sinsekvo de izolitaj eventoj, kiuj obeas la leĝojn de sinsekvo, sed racia kontinueco. Aldone, same kiel aferoj jam ekzistantaj estas harmonigitaj kunordigitaj, aferoj kiuj manifestiĝas al ekzisto montras la saman econ de kreado, anstataŭ la baza fakto de postsekvo.

*47

Se dio dirus al vi,'Morgaŭ, aŭ la tago poste, vi estos morta', nur se vi estas mizerulo vi enketus kiun tagon – ĉar kio estas la diferenco inter ili? Simile, ne alte taksu la aferon ĉu tio alvenos post jaroj kaj jaroj, aŭ morgaŭ.

*48

Rememorigu vin ĉiam pri ĉiuj, tiuj kuracistoj, nun mortaj, kiuj montis ĉargrenon pri siaj malsaniĝaj pacientoj; pri ĉiuj astrologoj kiuj solemne antaŭvidis la pereon de siaj klientoj; pri la filosofoj, kiuj klarigadis tiel senfine pri morto aŭ senmorteco; pri la generaloj kiuj nenigis milojn; pri la despotoj kiuj kontrolis la potencojn super la vivo aŭ la morto

arogante kiel Dioj; pri ĉiuj urboj kiuj ja pereis entute, Helice,Pompeii, Herculaneum, kaj aliaj sennombre. Post tio, rememoru ĉiun el viaj geamikoj kaj kolegoj; kiel unu enterigis la alian, kiu estis siavice enterigita per alia, kaj en tiel mallonga tempeto. Observu, koncize, kiel efemera kaj senkonsekvenca estas la homa vivo; hieraŭ gluteto de spermo, morgaŭ manpleno de cindroj. Travivu ĉi-tiujn forflugantajn momentojn sur la tero kiel Naturo intencas por vi, kaj poste iru al via dormado kun bona graco, kiel la olivo falas en ĝia sezono, kun beno al la grundo kiu ĝin estigis kaj dankodono al la arbo kiu vivigis ĝin.

*49

Estu kiel promontoro kontraŭ kiu la ondoj frapas kaj frapas: ĝi restas firma, ĝis post ne longe la akva tumulto ĉirkaŭ ĝi subeniĝas al ripozo. “ Kiel malfeliĉa mi estas, ke tio kaj tio okazis al mi!” Certe ne estas tiel; diru anstataŭe , ‘Kiel feliĉa mi estas, ke tiu afero ne lasis ĉe mi amaran senton; ne skuita per la nuntempo, kaj ne malgaja pri la estonto.’ La afero estus povinta okazi al ajna persono, sed ne ĉiu estus travivinta tion seniluziigita. Sekve kial sentigu unu aferon kiel malbonfortuna, kaj alian kiel bonfortuna? Ĉu homo povas ion ajn nomigi malbonfortuna, se ĝi ne estas kontraŭ la la volo de Naturo. Nu, vi ja lernis tiun volon. Ĉu tiu afero kiu okazis malhelpas al vi esti justa, grandanima, modera, prudenta, diskreta, fidinda, memrespektanta, sendependa, kaj ĉiuj aliaj virtoj kiuj emas en la naturo de homo maturiĝi? Tial memoru jenan regulon estonte, kiam io ajn logas vin esti amara; ne diru,”Tio estas malbonŝanco’, sed “Por elteni tiun aferon inde kiel homo estas bona fortuno’.

*50

Senkonsidere de filosofio, efektiva maniero ignori morton estas pripensi la vivojn de tiuj, kiuj avare provis reteni siajn vivojn. Kiun avantaĝon ili havas kompare al tiuj, kiuj mortis kiel junaj ?En ĉiu okazo, en iu loko kaj tempo, la grundo nun kovras ilin ĉiujn; Cadicianus, Fabius, Julianus, Lepidus, kaj la aliajn, kiuj rigardas tiom de iliaj tomboj, por nure pli poste estis gviditaj al la propraj. Estas tempeto, post ĉio, tiu komuto de morto; plilongigita ade kaj ade en tiaj aĉaj statoj, kun tiaj helpantoj, kaj kun tia korpaĉo. Tial ne zorgu pri tio; rigardu al la abismo de tempo malantaŭ ĝi, kaj al la eterneco alvenonta. Nu, se vi konsideras pri tio, kio estas Nestor kun liaj multaj jaroj ol tri-taga bebo.

*51

Ĉiam rekte iru; kaj la rekta vojo estas la vojo de Naturo, kun perfekta deco en ĉiu vorto kaj faro kiel via celo. Tia celo liberigos vin de maltrankvilo kaj konfliko, kaj de ĉia kompromiso kaj artifiko.

Tradukis **Wally du Temple (Kanado)**

NOVA ROMANO DE JULIAN MODEST

Esperanta eldonejo “Libera”, Antverpeno, eldonis novan romanon de la konata Esperanto verkisto Julian Modest “Amo kaj malamo” .

La romano havas allogan intrigon. La ĉefheroo, Plamen Filov, riĉulo, kies familio loĝas en “Lazuro”, la plej eleganta kvartalo de mara urbo Burgo, okaze de sia kvardekjariĝo organizas grandan feston, invitante multajn gastojn. Meznokte, kiam la gastoj foriras, Plamen Filov trovas en la korto de la domo minacan anoniman leteron. Post semajno iu murdas lin. Komisaro Kalojan Safirov, kiun la legantoj jam bone konas el la romano “Serenaj matenoj” de Julian Modest, komencas esplori kaj serĉi la murdiston.

La demandoj estas pluraj: kiu kaj kial murdis Plamen Filov? “Amo kaj malamo” estas por ĉiuj, kiuj deziras pasigi agrablajn horojn, ĝuante la bonegan Esperantan stilon de Julian Modest kaj perfektigi siajn lingvokonojn.

La romano estas mendebla ĉe: Lode Van Velde, Belgio, retadreso: lodchjo@yahoo.com

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elerno.cn/penlisto.htm

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_